Terpoma Skarabo

La terpoma skarabo (koloradia skarabo aŭ dekstria leptinotarso (*Leptinotarsa decemlineata*)) estas specio el la familio de foliskaraboj.

La terpoma skarabo estas flava kun nigraj makuloj ĉe la kola ŝildo kaj kun dek malhelaj strioj sur la flugiloj. Ĝi grandas ĉ. 1 cm.

La skarabo estas dismonde trovebla. Originale ĝi venis el Ameriko en 1877 al Eŭropo. La originala devenloko estis la usona federacia ŝtato Koloradio, tiel oni multloke nomas ĝin koloradia skarabo. La originala nutroplanto de la skarabo estis la "bubala lapo (arktio)" (*Solanum rostratum*), kiu apartenas al la familio de la solanacoj. La trairo al terpomo okazis verŝajne hazarde. Kun antaŭpenetro de la blankulaj setlantoj (kaj tiel ankaŭ la solanacaj plantoj) en Usono, la skarabo trovis novajn nutroplantojn por si.

En Hungario oni rimarkis la skarabojn unuafoje en 1947 ĉe Hédervár, kie oni inaŭguris memorajon je la 50-jara datreveno (vidu la skulptitan skarabon).

La terpomaj skaraboj kaj ties larvoj nutras sin per partoj de la terpoma planto (kaj aliaj solanacoj). La terpomaj skaraboj povas tutan agron detrui dum mallonga tempo.

La skaraboj demetas siajn ovojn en junio, el kiuj eloviĝas la larvoj jam 3 ĝis 12 tagojn pli poste. La larvoj koloras ruĝete kun nigraj punktoj. Post ĉ. 2-4 semajnoj rampas ili en la grundon por pupiĝi tie. Post 2 semajnoj aperas la terpomaj skaraboj, kiuj do restas ankoraŭ unu semajnon en la grundo. Jare aperas 1-2 skaraba generacioj. La skaraboj travintras en la tero.

Post fino de la dua mondmilito tiel abrupte pliiĝis la terpomaj skaraboj en la sovetaj okupitaj zonoj en Germanio, ke ĝis ĉ. 1950 preskaŭ la duono de la uzata agro estis tuŝita. La GDR-gvidantaro ne havis rimedojn por eviti la katastrofon kaj tiel eluzis la plagon por mispropagando en la malvarma milito. Ili asertis, ke en la Usono kultivitajn skarabojn subjetas el usonaj aviadiloj kiel biologian armilon, celante sabotadon de la socialista agrikulturo. Ekde 1950 ekis kampanjo sur afiŝoj kaj en gazetaro kontraŭ la usonskaraboj, kiujn oni nomis sabotantoj en usona dungo. Tiutempe oni ordonis al la loĝantaro, lernejaj klasoj kolekti la skarabojn, sed tio ne povis bari la disvastiĝon de la damaĝ-besto.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Terpoma_skarabo